# TEJO-aktuale: numero 239, 2010-03

### Konkurso Partoprenu IJK-n 2010

Ni ĝojas anonci ke la fonduso "Partoprenu IJK-n" denove povas helpi al membroj de TEJO partopreni la Internacian Junularan Kongreson - ĉi jare en KUBO!!! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1041

### Kandidatiĝu por Komitataneco B de TEJO

Venas la tempo por kandidatiĝi kiel Komitatano B de TEJO por la oficperiodo de la 1-a de junio 2010 ĝis la 31-a de majo 2012. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1042

### [tejo] PS2010: papera versio aĉetebla

La papera versio de Pasporta Servo nun disponeblas en la libroservo de UEA, kaj baldaŭ aliloke:
http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=3474
Plej amike, Aleks

### La AFRIKA KOMPILO alvenas!

La AFRIKA KOMPILO aperos surdiske komence de marto 2010. Sed jam eblas malkovri ĝian enhavon kaj elŝuti ĝin premiere en la elŝutejo de VINILKOSMO.
La kompilo konsistas el :
1. Albumeto 8 titola de la bando KONGA ESPERO
2. Tri titoloj de la bando VIGLA MUZIKO
3. Albumeto 7 titola de Mayoma kun jOmO kaj Afrika interludo
Eblas elŝuti la tutan kompletan kompilon (la samon kiel la disko) en la elŝutejo de Vinilkosmo ĉe:
http://www.facebook.com/l/0b6e9;www.vinilkosmo-mp3.com/afrika-kompilo-c-74_152.html

### JER (Junulara Esperanto Renkontiĝo) la 26-28-an de marto en la urbo Tiszafüred, Hungario

Kio estas JER? Bonega ebleco por ĉiuj hungaroj kaj eksterlandanoj kiuj volas renkontiĝi printempe amuziĝi kaj praktiki la lingvon dum longa semajnfino. :) JER estas kutima renkontiĝo de hungaraj junuloj kie la novuloj povas speri Esperantan vivon ĉe ni kun la helpo de spertaj helpemaj partoprenantoj. Nia celo estas montri kaj la lingvon kaj la esperantan movadon al ĉiuj kiujn interesas nia mondo kaj praktiki Esperanton ke poste ĉiuj junuloj povu partopreni pli da renkontiĝo, eĉ eksterlandajn. Ne forgesu ke la aliĝo al JER 2010 eblas ĝis la 22a de marto! Pri renkontiĝo JER 2010 vi povas legi pliajn detalojn ĉi tie: http://www.ijs.hu/?q=eo/node/138
organizanta grupo de HEJ

### Somera Esperanto-Studado (SES-2010) okazos inter la 2-a kaj la 10-a de julio 2010

Jam la tria fizika *lernu!*-renkontiĝo okazos en okcidentslovaka banurbo Piešťany, situanta 80 km for de la slovaka ĉefurbo Bratislava kaj 160 km de Vieno, ĉefurbo de Aŭstrio.

La programo konsistos el kelkaj partoj:

- Antaŭtagmeze - instruado pri Esperanto;
- Posttagmeze - ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp.;
- Vespere - Nacia kaj Internacia Vesperoj, koncertoj, filmo-spektado, diskoteko...

Esperanto-instruadon gvidos spertaj Esperanto-instruistoj en 4 grupoj, laŭ la lingvo-nivelo.

Pri la *lernu!*-programeroj zorgos *lernu!*-teamo. Eblos ĉeesti prezenton pri lernu.net, pri la traduk-sistemo de la paĝaro k.s. Vi estos bonvena iam ajn demandi aŭ proponi ion ajn, rilate al la paĝaro.

Novaĵoj por 2010:

- "Flugiloj de malfacila vento" - okazos seminario por instruemuloj! Ĉiujn instruemajn esperantistojn kun relative bona E-nivelo (B1-C1) ni invitas ĉeesti la porinstruistan seminarion, sub la gvido de ILEI-spertuloj. La "Flugiloj"-seminarioj okazas jam ekde la jaro 2003, enkadre de E-aranĝoj (pli da detaloj troviĝas en la parto Instruado).
- Ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER): B1, B2, C1. Eluzu raran eblon ekzameniĝi pri via Esperanto-scio, laŭ la nova komuna eŭropa referenckadro pri lingvoj (detalojn pri la KER-ekzamenoj vidu ĉe Instruado).
- Seminario de TEJO "Instigi Kreemon" - tiu ĉi aktivula trejnado celos instigi freŝan pensmanieron kaj krei novajn ideojn aŭ projektojn (pliajn detalojn vidu ĉe Instigi Kreemon).

Legu pli: http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index.php

### [tejo] IJK 2011 en Ukrainio!

TEJO ĝojas anonci, ke la 67-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Ukrainio. Tio estis decidita dum lasta reta estrarkunveno. Temo proponita por la kongreso estas "Stabila evoluo - nova koncepto por homaro". La aranĝo okazos julie 2011 proksime de Kijivo, ĉefurbo de Ukrainio. La organizan teamon de kreos UkrEA (Ukraina Esperanto Asocio) kaj ULEJ (Ukraina Ligo de Esperantista Junularo). Tio estos la unua IJK en Ukrainio. La kongresejo troviĝas proksime de la Kijiva akva rezervejo. (e-ukraina vortaro http://www.ukrainio.org.ua/vortaro/vortoj.htm)

Cetere, la 66-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Kubo. Pliajn informojn pri ĝi serĉu ĉe http://www.ijk-67.retejo.info/ĉefpaĝo

### TEJO-Seminario: Instigi Kreemon

Ĉu Vi foje ne havas impreson, ke en Esperanto-movado aperas (preskaŭ) ĉiam samaj aŭ tre similaj projektoj kaj ideoj? Evidente necesas ŝanĝi tion kaj trovi tute freŝan pensmanieron. Tial do TEJO kune kun organizantoj de Somera Esperanto-Studado preparas aktivulan trejnadon por instigi nian kreemon. La renkontiĝo celos krei novajn ideojn kaj projektojn, kaj ankaŭ lerni, kiel ĉiun ĉi kreemon pludoni al aliaj. En la seminario ĉefan rolon ludos diversspecaj praktikaj aktivaĵoj, kiuj intencos veki nian kreemon kaj doni videblajn efikojn. Tamen oni ankaŭ povas atendi ĉion neatenditan, ĉar la seminario dependos de la partoprenantoj kaj celos forlasi konatajn skemojn.
Al la seminario ni invitas aktivulojn de junularaj organizoj, kiuj volas doni ion novan al Esperanto. Le evento okazos kune kun Somera Esperanto-Studado, do inter la 2-a kaj la 10-a de julio 2010 en Piešťany, Slovakio. Pliajn informojn serĉu ĉe la paĝaro de SES: http://www.lernu.net/ses

### Verku por TEJO-Tutmonde

Ĉu vi partoprenis en interesa renkontiĝo? Eble vi regule aktivas en via loka Esperanto-klubo kaj de temp' al tempo organizas ion por-esperantan. Aŭ eble vi ĵus uzis Pasportan Servon por vojaĝi kaj vi ŝatus diskonigi al multaj homoj vian ĝojon! Aŭ eble vi emas priskribi la emociojn kiujn lasta disko de Vinilkosmo donis. Aŭ eble vi havas sensacian ideon por antaŭenigi la junularan movadon! Se vi respondis 'jes' al unu el la demandoj, ne atendu tro: verku artikolon por TEJO-Tutmonde!

Kontaktu: Nicola (TT-redaktoro)
tejo-tutmonde@tejo.org
msn: nicola.ruggiero@email.it
skajpo: nicolaruggiero

### Venontaj renkontiĝoj

June (nur 100-jare), sune, kune - Itala Esperanto-Kongreso ek de la 21-a de aŭgusto 2010 apud Venecio http://italakongreso.esperantoitalia.it/;

INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO 2010: JE PASKO EN TRENTINO, LA PLEJ MOJOSA REGIONO DE ITALIO! http://iej.esperanto.it/ijf/2010/index.eo.php;

Komuna Franca kaj 87a Germana Esperanto-Kongreso, 21a ĝis 24a majo (pentekosto), Kaiserslautern Germanio Pliaj informoj: http://esperanto-france.org/kaiserslautern2010 (france), http://esperanto.de/gea/anmeldung_dek.html (germane);

Beneluksa Kongreso, 13a ĝis 16a de Majo, Antverpeno, Belgio, Beneluksa Esperantokongreso kun Lingva Festivalo pri regionaj lingvoj (Frisa, Pikarda, Valona, ...) Ĉefa indeksa paĝo por la Kongreso de 2010: www.esperanto.be;

9. Kekso en Hamburg, 02.04. - 05.04.2010 (Germanio) http://www.esperanto.de/kej/kekso_e.html;

Blue floras la genciano 6 (Amuza junulara semajnfino) La Esperanto-junularoj de Baden-Virtembergo kaj Aŭstrujo invitas vin. 02.06 – 06.06.2010, Pliaj informoj kaj ALIĜILO: Inge Simon, Brünner Str. 20, D-73431 Aalen, Tel: 0049/7361/360615 (poŝtelefono: 0049/170/4739318), Retpoŝto:Inge.Simon ĉe esperanto.de;

HEJ invitas al IJS, de la 3-a ĝis la 9-a de aŭgusto, en la urbo Pécs http://www.ijs.hu/?q=eo/IJS-2010_;

1-a PRINTEMPE, 2-a - 6-a de apr. 2010, supozeble en Eifel-montaro http://www.esperantoland.org/printempe/; <br> 8-a SOMERE, 23-a de julio - 6-a de augusto 2010 en Jünkerath/Eifel http://www.esperantoland.org/somere/;

9-a Novjara Renkontiĝo (NR), 27a de dec. 2010 - 3a de jan. 2011 supozeble en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nr/;

2-a Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj (ĉ. 14 - 30jaraj) 27-a de dec. 2010 - 3-a de jan. 2011 supozeble en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nis/;

Senpaga E-ferio en Danio - Roskilde-Festivalo!, 27.6. – 5.7.2010 http://roskilde.festoklubo.dk;

. la 21-a IJS en Pécs, Hungario, inter la 3-a kaj 9-a de aŭgusto http://tejo.org/eo/node/1044;

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu

### Konkurso Partoprenu IJK-n 2010

Ni ĝojas anonci ke la fonduso "Partoprenu IJK-n" denove povas helpi al membroj de TEJO partopreni la Internacian Junularan Kongreson - ĉi jare en KUBO!!! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1041

### Kandidatiĝu por Komitataneco B de TEJO

Venas la tempo por kandidatiĝi kiel Komitatano B de TEJO por la oficperiodo de la 1-a de junio 2010 ĝis la 31-a de majo 2012. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1042

### [tejo] PS2010: papera versio aĉetebla

La papera versio de Pasporta Servo nun disponeblas en la libroservo de UEA, kaj baldaŭ aliloke:
http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=3474
Plej amike, Aleks

### La AFRIKA KOMPILO alvenas!

La AFRIKA KOMPILO aperos surdiske komence de marto 2010. Sed jam eblas malkovri ĝian enhavon kaj elŝuti ĝin premiere en la elŝutejo de VINILKOSMO.
La kompilo konsistas el :
1. Albumeto 8 titola de la bando KONGA ESPERO
2. Tri titoloj de la bando VIGLA MUZIKO
3. Albumeto 7 titola de Mayoma kun jOmO kaj Afrika interludo
Eblas elŝuti la tutan kompletan kompilon (la samon kiel la disko) en la elŝutejo de Vinilkosmo ĉe:
http://www.facebook.com/l/0b6e9;www.vinilkosmo-mp3.com/afrika-kompilo-c-74_152.html

### JER (Junulara Esperanto Renkontiĝo) la 26-28-an de marto en la urbo Tiszafüred, Hungario

Kio estas JER? Bonega ebleco por ĉiuj hungaroj kaj eksterlandanoj kiuj volas renkontiĝi printempe amuziĝi kaj praktiki la lingvon dum longa semajnfino. :) JER estas kutima renkontiĝo de hungaraj junuloj kie la novuloj povas speri Esperantan vivon ĉe ni kun la helpo de spertaj helpemaj partoprenantoj. Nia celo estas montri kaj la lingvon kaj la esperantan movadon al ĉiuj kiujn interesas nia mondo kaj praktiki Esperanton ke poste ĉiuj junuloj povu partopreni pli da renkontiĝo, eĉ eksterlandajn. Ne forgesu ke la aliĝo al JER 2010 eblas ĝis la 22a de marto! Pri renkontiĝo JER 2010 vi povas legi pliajn detalojn ĉi tie: http://www.ijs.hu/?q=eo/node/138
organizanta grupo de HEJ

### Somera Esperanto-Studado (SES-2010) okazos inter la 2-a kaj la 10-a de julio 2010

Jam la tria fizika *lernu!*-renkontiĝo okazos en okcidentslovaka banurbo Piešťany, situanta 80 km for de la slovaka ĉefurbo Bratislava kaj 160 km de Vieno, ĉefurbo de Aŭstrio.

La programo konsistos el kelkaj partoj:

- Antaŭtagmeze - instruado pri Esperanto;
- Posttagmeze - ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp.;
- Vespere - Nacia kaj Internacia Vesperoj, koncertoj, filmo-spektado, diskoteko...

Esperanto-instruadon gvidos spertaj Esperanto-instruistoj en 4 grupoj, laŭ la lingvo-nivelo.

Pri la *lernu!*-programeroj zorgos *lernu!*-teamo. Eblos ĉeesti prezenton pri lernu.net, pri la traduk-sistemo de la paĝaro k.s. Vi estos bonvena iam ajn demandi aŭ proponi ion ajn, rilate al la paĝaro.

Novaĵoj por 2010:

- "Flugiloj de malfacila vento" - okazos seminario por instruemuloj! Ĉiujn instruemajn esperantistojn kun relative bona E-nivelo (B1-C1) ni invitas ĉeesti la porinstruistan seminarion, sub la gvido de ILEI-spertuloj. La "Flugiloj"-seminarioj okazas jam ekde la jaro 2003, enkadre de E-aranĝoj (pli da detaloj troviĝas en la parto Instruado).
- Ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER): B1, B2, C1. Eluzu raran eblon ekzameniĝi pri via Esperanto-scio, laŭ la nova komuna eŭropa referenckadro pri lingvoj (detalojn pri la KER-ekzamenoj vidu ĉe Instruado).
- Seminario de TEJO "Instigi Kreemon" - tiu ĉi aktivula trejnado celos instigi freŝan pensmanieron kaj krei novajn ideojn aŭ projektojn (pliajn detalojn vidu ĉe Instigi Kreemon).

Legu pli: http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index.php

### [tejo] IJK 2011 en Ukrainio!

TEJO ĝojas anonci, ke la 67-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Ukrainio. Tio estis decidita dum lasta reta estrarkunveno. Temo proponita por la kongreso estas "Stabila evoluo - nova koncepto por homaro". La aranĝo okazos julie 2011 proksime de Kijivo, ĉefurbo de Ukrainio. La organizan teamon de kreos UkrEA (Ukraina Esperanto Asocio) kaj ULEJ (Ukraina Ligo de Esperantista Junularo). Tio estos la unua IJK en Ukrainio. La kongresejo troviĝas proksime de la Kijiva akva rezervejo. (e-ukraina vortaro http://www.ukrainio.org.ua/vortaro/vortoj.htm)

Cetere, la 66-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Kubo. Pliajn informojn pri ĝi serĉu ĉe http://www.ijk-67.retejo.info/ĉefpaĝo

### TEJO-Seminario: Instigi Kreemon

Ĉu Vi foje ne havas impreson, ke en Esperanto-movado aperas (preskaŭ) ĉiam samaj aŭ tre similaj projektoj kaj ideoj? Evidente necesas ŝanĝi tion kaj trovi tute freŝan pensmanieron. Tial do TEJO kune kun organizantoj de Somera Esperanto-Studado preparas aktivulan trejnadon por instigi nian kreemon. La renkontiĝo celos krei novajn ideojn kaj projektojn, kaj ankaŭ lerni, kiel ĉiun ĉi kreemon pludoni al aliaj. En la seminario ĉefan rolon ludos diversspecaj praktikaj aktivaĵoj, kiuj intencos veki nian kreemon kaj doni videblajn efikojn. Tamen oni ankaŭ povas atendi ĉion neatenditan, ĉar la seminario dependos de la partoprenantoj kaj celos forlasi konatajn skemojn.
Al la seminario ni invitas aktivulojn de junularaj organizoj, kiuj volas doni ion novan al Esperanto. Le evento okazos kune kun Somera Esperanto-Studado, do inter la 2-a kaj la 10-a de julio 2010 en Piešťany, Slovakio. Pliajn informojn serĉu ĉe la paĝaro de SES: http://www.lernu.net/ses

## Verku por TEJO-Tutmonde

Ĉu vi partoprenis en interesa renkontiĝo? Eble vi regule aktivas en via loka Esperanto-klubo kaj de temp' al tempo organizas ion por-esperantan. Aŭ eble vi ĵus uzis Pasportan Servon por vojaĝi kaj vi ŝatus diskonigi al multaj homoj vian ĝojon! Aŭ eble vi emas priskribi la emociojn kiujn lasta disko de Vinilkosmo donis. Aŭ eble vi havas sensacian ideon por antaŭenigi la junularan movadon! Se vi respondis 'jes' al unu el la demandoj, ne atendu tro: verku artikolon por TEJO-Tutmonde!

Kontaktu: Nicola (TT-redaktoro)
tejo-tutmonde@tejo.org
msn: nicola.ruggiero@email.it
skajpo: nicolaruggiero

## Venontaj renkontiĝoj

June (nur 100-jare), sune, kune - Itala Esperanto-Kongreso ek de la 21-a de aŭgusto 2010 apud Venecio http://italakongreso.esperantoitalia.it/;

INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO 2010: JE PASKO EN TRENTINO, LA PLEJ MOJOSA REGIONO DE ITALIO! http://iej.esperanto.it/ijf/2010/index.eo.php;

Komuna Franca kaj 87a Germana Esperanto-Kongreso, 21a ĝis 24a majo (pentekosto), Kaiserslautern Germanio Pliaj informoj: http://esperanto-france.org/kaiserslautern2010 (france), http://esperanto.de/gea/anmeldung_dek.html (germane);

Beneluksa Kongreso, 13a ĝis 16a de Majo, Antverpeno, Belgio, Beneluksa Esperantokongreso kun Lingva Festivalo pri regionaj lingvoj (Frisa, Pikarda, Valona, ...) Ĉefa indeksa paĝo por la Kongreso de 2010: www.esperanto.be;

9. Kekso en Hamburg, 02.04. - 05.04.2010 (Germanio) http://www.esperanto.de/kej/kekso_e.html;

Blue floras la genciano 6 (Amuza junulara semajnfino) La Esperanto-junularoj de Baden-Virtembergo kaj Aŭstrujo invitas vin. 02.06 – 06.06.2010, Pliaj informoj kaj ALIĜILO: Inge Simon, Brünner Str. 20, D-73431 Aalen, Tel: 0049/7361/360615 (poŝtelefono: 0049/170/4739318), Retpoŝto:Inge.Simon ĉe esperanto.de;

HEJ invitas al IJS, de la 3-a ĝis la 9-a de aŭgusto, en la urbo Pécs http://www.ijs.hu/?q=eo/IJS-2010_;

1-a PRINTEMPE, 2-a - 6-a de apr. 2010, supozeble en Eifel-montaro http://www.esperantoland.org/printempe/; <br> 8-a SOMERE, 23-a de julio - 6-a de augusto 2010 en Jünkerath/Eifel http://www.esperantoland.org/somere/;

9-a Novjara Renkontiĝo (NR), 27a de dec. 2010 - 3a de jan. 2011 supozeble en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nr/;

2-a Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj (ĉ. 14 - 30jaraj) 27-a de dec. 2010 - 3-a de jan. 2011 supozeble en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nis/;

Senpaga E-ferio en Danio - Roskilde-Festivalo!, 27.6. – 5.7.2010 http://roskilde.festoklubo.dk;

. la 21-a IJS en Pécs, Hungario, inter la 3-a kaj 9-a de aŭgusto http://tejo.org/eo/node/1044;

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu